

# Jean Esperanto Info

Magazine de l'association Espéranto-Jeunes : JEFO-Informas  
Trimestriel • n°2006/2 • 2 €

ESPERANTO

אספראנטו

Εσπεράντο

إسبيرانتو

ኤስፔራንቶ

Эсперанто

Mezorianta numero



Park-promenado en Raŝt post la Zamenhof-taga festo, decembro 2004

## Nuntempa Irana Esperanta Movado

**Esperanto-movado havas longan historion en Irano. En septembro 1916, unufoje kelkaj esperantistoj kunsidis en Teherano kaj fondis Persian Esperanto-Asocion (1). Do ĉi-jare oni festas 90-jariĝon de irana movado. Tie ĉi mi ne celas prezenti historion de Esperanto-movado en Irano, sed priskribi pri la nuna stato de tiu movado laŭbezone menciante kelkajn historiajn notojn.**

### Organizajoj

Irana Esperanto-Asocio, Irana Esperantista Junulara Organizo, Sabzandiŝan-Instituto kaj Irana Ligo de Esperantistaj Instruistoj estas la iranaj esperantaj organizaĵoj kiuj estas prezentataj.

### Irana Esperanto-Asocio

Irana Esperanto-Asocio (IREA) fondiĝis en 1996 kaj akceptiĝis kiel landa asocio de UEA lastjare dum la UK en Vilno. Oni miras kial movado kun tiom longa historio ne posedis aliĝintan asocion ĝis nun, se oni ne scias la historion de nia movado.

Sendube la nuna movado en Irano ŝuldas sian prosperon al la klopodoj de D-ro Saheb-Zamani. Li komencis siajn Esperanto-aktivadojn antaŭ la islama revolucio en 1979. Li estis fama psikologo kaj krom siaj Esperanto-agadoj, li estis politike kaj socie aktiva persono. Post la revolucio, li daŭrigis siajn Esperanto-aktivadojn sed pro sia antaŭa personeco, li ne povis libere aktivi.

Estis persekutoj kontraŭ li kaj Esperanto, precipe far instruistoj de la angla, kondamnante E-on al rilato kun cionismo pro la juda deveno de Zamenhof. D-ro Saheb-Zamani elspezis grandan forton por batali kaj sukcesis jure venki la kondamnintojn. Sed la etoso, kion ili faris bezonis longan tempon por ŝanĝiĝi.

Precipe pro tio, li kredis ke irana Esperanto-movado ne bezonas asocion aŭ revuon por prosperi. Eble li timis aŭ ne povis paŝi ĉi-direkten pro la etoso

ĉirkaŭ si. Aliflanke movado de D-ro Saheb-Zamani fakte ne estis demokratia kaj li deziris ne perdi sian estrecon. Pro tio longtempe irana movado malgraŭ siaj meritoj ne posedis asocion aŭ revuon. D-ro Saheb-Zamani kredis ke ekzistas sufiĉe da Esperantogazetoj en la mondo kaj instigis nin verki por ili. Tial aperis historia numero de Kontakto kies enhavon preskaŭ tute verkis irananoj.

Ekde 1992 aperis grupo de junaj esperantistoj, kiuj deziris labori pli libere. La ĉefmotoro de tiu grupo estis S-ro Reza Torabi. Ili sukcesis fondi IREJO-n kaj aliĝi ĝin al TEJO. La grupo ŝvelis kaj ensorbis kelkajn aktivulojn de la grupo de D-ro Saheb-Zamani, kaj fondis Sabzandiŝan-Instituton, la revuon 'Irana Esperantisto', kaj IREA-on dum la venintaj jaroj.

Bedaŭrinde IREA ne havas multe da membroj ; ĉirkaŭ 50 dum la pasinta jaro. Obstakloj al grandigo de la asocio multas sed ni povas mencii du : mankon de landa kongreso por kolekti esperantistojn kaj instigi ilin pagi kotizon kaj oficiale membriĝi ; kaj eblecon aĉeti la revuon 'Irana Esperantisto' de la strataj kioskoj aŭ aboni ĝin sen aliĝi al IREA.

### Irana Esperantista Junulara Organizo

Irana Esperantista Junulara Organizo (IREJO) estas la pli malnova junulara sekcio de IREA. Ĝi fondiĝis en 1993 kaj akceptiĝis kiel landa sekcio de TEJO en 1994 dum la IJK en Koreio. Ĝi iam estis aktiva organizaĵo kaj eĉ posedis samtempe tri komitatajn en TEJO-komitato.

Sed dum la lastaj jaroj kaj post la transiro de siaj aktivuloj al mezaĝeco, ĝi bedaŭrinde perdis sian aktivecon. Oni klopodas reaktivigi ĝin sed ni devas ankoraŭ atendi por tiu evento.

### Sabzandiŝan-Instituto

Tiu instanco estas oficiale registrita privata instituto por propagandi kaj instrui la lingvon Esperanto. Sabzandiŝan signifas Verdpensuloj en la persa. Fakte ĝi estis la bazo por fondi IREA-on kaj la portalo por havi rilatojn kun iranaj organizaĵoj, ĉar registri IREA-on kiel oficialan asocion bezonas penigan laboron kaj daŭran tempon sed registriĝo de privata lingvo-institucio estas multe pli facila tasko.

### Irana Ligo de Esperantistaj Instruistoj

La landa sekcio de ILEI ankaŭ ne estas aktiva nuntempe. Felice la membroj de Irana Ligo de Esperantistaj Instruistoj (IRLEI) decidis reaktivigi ĝin.

### Oficejo

Ekzistas oficejo ekde 1997 en Teherano. La lokoj estis luprenitaj inkluzive de la nova ; pro tio la lokoj ŝanĝiĝis 4-foje dum la pasintaj jaroj. Instalita kampanjon por aĉeti lokon estas diskutata.

### Revuo

La organo de IREA estas 'Irana Esperantisto'. Relative belaspekta kaj bonkvalita pli-ol-3-jara revuo aperas por montri al neesperantistoj ke nia lingvo ne nur apartenas al la pli-famaj landoj ; Esperanto estas vere

taŭga komunikilo por ĉiuj mondanoj. Irana Esperantisto estas nemalhaveblaĵo por ĉiu esperanta asocio, instituto, klubo, ekspozicio, biblioteko, kaj tiel plu, kiu celas varbi Esperanton kiel vere universalan lingvon.

Sezona 56-paĝa revuo estas ĝuste duone en la persa kaj duone en Esperanto. La persa kaj oficiala nomo de la revuo estas 'Pajam-e Sabzandiŝan' (Mesaĝo de verdpensuloj). En la esperanta parto vi povas trovi artikolojn pri iranaj kulturo, literaturo, kino, turismo kaj Esperanto-movado. Sed troveblas ankaŭ artikoloj de alilandaj kontribuantoj. Ni bone lernis de la sorto de «El Popola Ĉinio» kaj klopodas ne limigi nian revuon al artikoloj nur pri nia lando. La persa parto ĉefe enhavas artikolojn pri Esperanto kaj ties movado kaj celas allogi la legantojn al nia lingvo.

La rajton eldoni Iranan Esperantiston oni gajnis post 5-jara laboro por konvinki iranajn respondeculojn. «Irana Esperantisto» eldoniĝas per la financaj helpoj de iranaj esperantistoj en- aŭ ekster-lande loĝantaj. Malgraŭ la akceptebla kvalito de Irana Esperantisto, la nombro de la abonantoj estas malpli ol atendate. Ni rekomendas al ĉiu Esperanto-instanco kiu celas varbi nian lingvon, aboni ĝin kaj krom subteni ĝin finance, utiligi ĝin varbocele. Vidi iranajn esperantan revuon povas esti pli granda surprizo ol vidi tian revuon ekzemple el okcidenta eŭropo. Aliflanke ni bonvenigas artikolojn de alilandaj esperantistoj. Irana Esperantisto ne nur apartenas al iranaj esperantistoj kaj ne celas nur prezenti Iranon.

**Libroj**

Dum la lastaj monatoj eldoniĝis du gravaj lernolibroj : La nova eldono de «La Dua Lingvo» de D-

ro Saheb-Zamani, libro pere de kiu multaj irananoj konatiĝis kun Esperanto kaj lernis ĝin ; kaj «La Plej Facila Lingvo de la Mondo» de Inĝ. Ahmad Reza Mamduhi, la prezidanto de IREA. Ambaŭ libroj estas vere bezonataj por Esperanto-instruado al perslingvanoj kaj plenigis longtempe malplenan lokon de novaj lernolibroj. Baldaŭ aperos alia libro de Inĝ. Ahmad Reza Mamduhi kiu baziĝis sur la persa traduko de «La Fenomeno de Esperanto» de William Auld kaj celas prezenti la lingvon al la irana publiko.

**Kunsidoj**

Ni klopodas organizi iranajn Esperanto-kongreson sed ankoraŭ ne sukcesis precipe pro financaj problemoj. Zamenhof-tagon ni festas kutime. En 2004 okazis tri kunsidoj en tri iranaj urboj : Raŝt, Maŝhad kaj Ŝiraz. Tio en Raŝt (Foto 1) okazis en granda salono apartenanta al banko kaj la du aliaj en universitataj atmosferoj. Pasintjare la festo okazis en la ateliero de S-ro Habibpur, esperantistopentristo (Foto 2). La KD de la programo aĉeteblas ĉe la oficejo.

En la oficejo de IREA ĉiumonate okazas esperanta prelego. La temoj estas variaj kaj elektas ilin la preleganto mem. Se vi planas vojaĝi al Teherano kaj vi deziras partopreni aŭ prelegi, bonvolu kontakti min. Ni ankaŭ kunsidas ĉiu-lunde vespere en la oficejo kaj laŭbezzone (precipe pro alilandaj gastoj) dum la aliaj tagoj de la semajno.

Malgraŭ pli-malpli stabila stato de irana Esperanto-movado (asocio, revuo, oficejo, kunsidoj,...), mi kredas ke ĝi estas en sia nadiro de aktivado. Pasinte la homa forto estis pli granda, kvankam la bazo aŭ ne-homaj fortoj estis malpli. Ni multe diskutis pri

**Interreto**

Se vi deziras ricevi plian informon pri Esperanto-movado en Irano, vi povas viziti : [www.sabzandishan.com](http://www.sabzandishan.com) (oficiala adreso de Sabzandiŝan-Instituto) [www.esperanto.blogfa.com](http://www.esperanto.blogfa.com) (persa blagejo por aktualaj informoj ; esperanta versio konstruatas.) [iranaj-esperantistoj@yahoogroups.com](mailto:iranaj-esperantistoj@yahoogroups.com) (grupo pri irana Esperanto-movado)

tiu afero dum niaj kunsidoj sed ne trovis la kialon :

- Ĉu la financa stato de irananoj estas la kialo ? Ne. Nun nia ŝtato vendas nafton kelkoble pli multekoste ol pasinte kaj la financa stato de irananoj estas multe pli bone.

- Ĉu la minaco de milito estas la problemo ? Kiam Teherano estis bombardata de irakaj aviadiloj kaj misiloj, okazis Esperanto-kursoj en la ĉefurbo. Nun kiam estas nur minaco de milito, ne estas logike ke ĝi estu la kaŭzo de malpli-aktiveco de la movado.

- Ĉu irana ŝtato malhelpas Esperanto-movadon ? Ĝis nun oni ne vidis specialan malhelpon aŭ kontraŭstaron flanke de la ŝtato kontraŭ Esperanto.

Ŝajnas ke la nuna stato estas simpla nadiro en la aktivado de irana movado. Ni esperas fruan pason de tiu periodo kaj plivigliĝo de nia movado.

*D-ro Keyhan Sayadpour, komitatano de IREA*

[ksayadpour@yahoo.com](mailto:ksayadpour@yahoo.com)



*Festo por naskiĝtago de Zamenhof en Teherano, decembro 2005*

*Referaĵo :*  
1- Alireza Dolatŝahi. Historio de Esperanto en Irano (1). Irana Esperantisto. Unua numero; aŭtuno 2002: paĝoj 5-6.

*Kiel kontakti IREA-oficejon:*  
Strata adreso: Numero 33, Alizade strateto, Ĥagani Strato, Engelab Avenuo, Teherano  
Poŝta adreso: P.O.Kesto 184, Teherano 17765, Irano  
Telefakso: +98-21-88824104  
E-poŝto: [info@sabzandishan.com](mailto:info@sabzandishan.com)

## Des blogs en esperanto

Vous avez certainement entendu parler des blogs, ces sites personnels qu'on remplit comme un journal intime. Pas si intime que ça du reste, puisque le but est de raconter sa vie privée au reste de la planète. Dans le monde espérantophone, on trouve de plus en plus de blogs, que ce soit en espéranto ou au sujet de l'espéranto. Certains sites qui permettent de créer des blogs en quelques minutes ont même leur interface traduite en espéranto, par exemple <http://livejournal.com>

Ce site contient également une communauté de «blogueurs» espérantistes assez étoffée, visible sur <http://esperanto.livejournal.com>

### lire en espéranto...

Il existe de nombreux avantages aux blogs en espéranto, le premier est celui de s'accoutumer

Certains sites proposent des agrégats de différents blogs, cela permet d'un seul coup d'œil de parcourir des blogs d'auteurs différents. Je vous recommande la lecture de <http://e-planedo.kerno.org/> (et pas uniquement parce que mon blog y est référencé)

à lire des textes dans cette langue. Quand on commence à apprendre la langue internationale, la pratique est indispensable à l'amélioration de ses connaissances. Les blogs sont souvent des textes courts sur des sujets très variés (tout dépend de l'auteur du billet). Petit à petit, vous allez trouver des sites qui abordent des sujets qui vous intéresseront plus que d'autres et vous finirez par suivre régulièrement la vie de certaines personnes que vous n'avez jamais rencontrées. Vous serez certainement amené à rencontrer ces personnes lors d'un congrès en connaissant pratiquement tout de leur avis avant même de les avoir vues.

### écrire en espéranto...

Quand on prend la place d'auteur de blog, on découvre un autre avantage, celui d'affiner sa plume. Se forcer à écrire régulièrement dans un blog permet d'améliorer sa capacité à rédiger en espéranto. Il faut idéalement se faire relire par des espérantistes chevronnés, mais lorsque votre blog est un peu connu, vous pouvez être sûr qu'une faute de grammaire ou d'orthographe ne passera pas inaperçue et les lecteurs qui l'auront remarquée ne manqueront pas de vous le signaler. Enfin, un point important des blogs est la transmission d'informations.

### se faire connaître...

Si vous êtes impliqué dans une association locale d'espéranto, il me semble très important de parler des projets que vous menez au sein de l'association, même si ceux ci peuvent paraître

Quelques blogs amis chez livejournal :

<http://felix.livejournal.com/>  
<http://a2na.livejournal.com/>  
<http://goulo.livejournal.com/>  
<http://karulin.livejournal.com/>

tre anodins, il est important de transmettre aux autres actifs espérantistes un constat des actions qui fonctionnent et celles qui ne fonctionnent pas. Que de temps perdu à reproduire les mêmes erreurs aux quatre coins du monde !

### ... dans le monde entier

En rédigeant un blog sur les activités de votre association ou groupe local, vous devenez le porte-parole de ce groupe et vous vous assurez une visibilité plus importante, d'autant plus que les blogs représentent un système performant de bouche-à-oreille et qu'une information diffusée via un blog peut faire le tour de la planète en un temps record.

### La preuve ?

Le 5 mai, j'annonçai par quelques lignes dans mon blog la naissance de [farbskatol.net](http://farbskatol.net)<sup>(1)</sup> Dans les heures suivantes, les visiteurs sont arrivés des quatre coins du monde ; dès le lendemain, le site enregistrait mille visites par jour et trois jours plus tard, un article dans *libera folio*<sup>(2)</sup> parlait de ce nouveau site.

Axel

<http://axel584.livejournal.com>

(1) : voir page 5

(2) : [www.liberafolio.org/2006/farbskatol-1](http://www.liberafolio.org/2006/farbskatol-1)

## Devinette

Le site [farbskatol.net](http://farbskatol.net) reçoit en moyenne 400 visites par jour, de diverses origines (les visiteurs viennent d'une quarantaine de pays différents). Quels sont, à votre avis les deux navigateurs les plus utilisés ? Et en quelle proportion ?



# Nova luno

Se brilas la nova luno,  
alkuras la hom lupo

Zamenhofa poverbo



Se vi kutimas frekventi la esperanto-sekton, eble vi jam renkontis disĉiplojn de sekreta sekteto kiu enĉambrigas nokte por aranĝi strangajn kunvenojn en rondo... Se vi jam aŭskultis ilin interparoli, vi jam notis mirindajn sekretajn vortojn nur de ili kompreneblaj kiel “SoVo”, “SoPoVo”, “homlupo”, “klarvidulino” aŭ “pafisto”. Kelkaj eĉ atestas ke dum siaj nigraj mesoj ili faras strangajn manmovojn !

Feliĉe, tiu sekteto ne tre danĝeras kaj nur kontentiĝas ludante la tiel nomitan “homlupan ludon”. Kaj, feliĉaj sektanoj, ili nun povas konatiĝi kun la nova krompakajo, kiun eldonis fine de marto la kreintoj de la ludo, Philippe des Pallières kaj Hervé Marly<sup>(1)</sup>.

## Por la senpekaj ŝafidoj...

Por la nekonantoj, kelkaj bazaj klarigoj estas necesaj. La principo simplas: la partoprenantoj (inter ok kaj dek ok personoj) ludas la rolon de vilaĝanoj, el kiuj kelkaj estas sekrete homlupoj. Tiuj ĉi agas tute normale dum la tagoj, sed vekiĝas ĉiunokte por formanĝi unu el siaj malfeliĉaj kunloĝantoj. Tage, la sinceraj kaj bonaj vilaĝanoj klopodas eltrovi unu el la homlupoj kaŝitaj inter ili, ekzekutante iun, kies konduton ili juĝas suspektinda (ofte malprave) ! Kompreneble, la ludo tiel daŭras ĝis unu flanko fine sukcesas elludigi la alian.

Kiel konkrete okazadas ĉio ĉi? Gvidanto, kiu ne mem partoprenas sed mastrumas la ludon, komence disdonas po unu sekretan karton, kiu difinas al ĉiu ties rolon. Dum la nokto, ĉiuj

vilaĝanoj fermas la okulojn, kaj la gvidanto vokas tiujn, kiuj ricevis homlupo-karton. Tiuj ĉi vekiĝas por silente montri tiun, kiun ili formanĝas, kaj redormas. Dum la tago, la vilaĝo unue ekkonas la viktimon de la pasinta nokto, kiu montras sian karton kaj ne plu rajtas paroli. Post debato, en kiu ili diskutas pri tiuj (eventuale) suspektindaj pro homluppeco, ĉiuj vilaĝanoj (eĉ la homlupaj !) mane voĉdonas por elekti tiun ekzekutendan. Tiu ĉi siavice forlasas la ludon montrante sian karton. Komenciĝas nova nokto, kaj tiel plu.

Sed por spicigi kaj kompliki la aferon, ankaŭ ekzistas aro da vilaĝanoj kun sekretaj specialaj kapabloj. Tiuj ĉi kompreneble ne estas konataj, sed ili havas la gravan rolon helpi la aliajn en ilia tasko senmaskigi la homlupojn... Mi ne detaligos ĉiujn ĉi specialulojn, krom unu kies rolo estas gravega: la klarvidulino. Ŝi havas la potencon kapablon ekscii la sekretan identecon de unu ludanto ĉiunokte. Kiam ekdormis ĉiuj, la gvidanto vokas ŝin antaŭ la homlupoj, kaj ŝi montras tiun, kies identecon li malkaŝu al ŝi. Tage, ŝi devos uzi siajn informojn por akuzigi la homlupojn malkovritajn de ŝi, aŭ senkulpiĝi la aliajn. Sed ŝi estu lerta kaj diskreta, ĉar la homlupoj serĉadas ŝin por salti sur ŝin ĉe la unua okazo !

La aliaj vilaĝanoj havantaj specialajn kapablojn ne estas nepre uzendaj, sed ĉiu el ili havas sian propran rolon en la batalo kontraŭ la homlupo kaj aldonas plian intereson al la ludo. Nur menciindas iliaj nomoj: la sorĉistino, la urbestro, la ŝtelisto, la knabineto, la ĉasisto, kupidono kaj la amantoj.

La homlupa ludo, kiu estas fakte adaptaĵo de malnova ludo el Rusio (konata per la nomo “mafia”), kreas viglan interparolan etoson, kaj fortan dependecon ĉe la ludantoj. En pluraj okazoj,

oni vidis frenezulojn ludi tutan nokton ! En la esperanto-medio, ĝi jam pruvis sin ne nur plaĉa sed bonege paroliga kaj interkoniga ekzerco - tiel taŭga por komencantoj kiel por pli spertaj esperantistoj. La interesatoj trovos la plenan regularon de la ludo en esperanto en la retejo de JEFO<sup>(2)</sup>.


## Por tiuj jam morditaj...

Kiel jam dirite, ili ĝoju ĉar, post longa atendado kaj multaj prokrastoj, eldoniĝis fine de pasinta marto la unua krompakajo nomita **Nova Luno**. Tiu nova skatolo proponas novajn ideojn, variantojn, kaj rolojn, kiuj povas pliriĉigi la bazan ludon. Inter tiuj novaĵoj, plej prezentindas la ĝuste nomita “nova luno” kiu uzas novan kartaron “eventoj”. Ĉiun matenon, la gvidanto eltiras unu “evento-karton” kiu starigas efektojn sur la ludo provizore aŭ ĝis la fino. Estas sume 36 evento-kartoj. Jen kelkaj ekzemploj :

“*Granda Malfido* - ventego de malfido bloviĝas tra la vilaĝo. La vilaĝanoj havas po 2 voĉojn uzotajn por montri siajn preferatajn amikojn. La voĉdono okazu samtempe, per ambaŭ manoj, ĉe la signalo de la ludestro. Se unu aŭ pluraj ludantoj ricevis nenium voĉdonon, ili estu elluditaj.”

“*Somnambulismo* - la klarvidulino fariĝis somnambula. Ekde nun ĝis la fino de la ludo, la ludestro laŭte eldiros la sekretan identecon de la persono, kiun ŝi montris. Tamen, oni daŭre plu ne scios kiun ludanton ŝi spionis.”

“*Bonaj kondutoj* - vi estas ĝentilaj vilaĝanoj: estas malper-



(1) <http://lesloupsgarous.free.fr/>

(2) [http://esperanto-jeunes.org/article.php3?id\\_article=139](http://esperanto-jeunes.org/article.php3?id_article=139)



mesite interrompi ies parolon. Ĉiu parolu laŭvice, sub kontrolo de la gvidanto. Ĉia ludanto, kiu kontraŭiras tiun regulon, perdas sian rajton voĉdoni dum tiu ludvico.”

Ankaŭ plaĉos al vi la “spiritismaj” kartoj, kiuj ebligas fari rondon gvidatan de spiritisto, kiu alvokas mortinton por fari al tiu ĉi unu demandon. Inter la eblaj demandoj estas : “ĉu tiu ludanto estas simpla vilaĝano ?”, “ĉu unu el la homlupoj estas urbestro ?”, “ĉu tiuj du ludantoj estas el la sama flanko ?”, “ĉu unu homlupo estas fumanto ?”...

Kompreneble, mi ne priskribos ĉiujn naŭ variantojn disponigitajn de *Nova Luno*... Vi konatiĝu mem kun la freneza “Rikoltofesto” (kie ĉiuj vilaĝanoj ne plu agas normale pro troa ebrieco), kun la komplikita “Duobla Mi” (kie ili havas du identecojn) aŭ kun la konfuziga “Nigra Pesto”... En *Nova Luno*, la muroj parolas, la homlupoj kapablas fascini anstataŭ mortigi, kaj oni laŭdire eĉ povas ludi ducentope !

Sed ne nur novaj manieroj ludi estas proponitaj. Ankaŭ estis atendataj novaj personoj, kaj ili alvenis. Novaj roloj kun novaj kapabloj en la lukto kontraŭ la lupoj. Iliaj nomoj estas la Stultulo, la Saĝulo, la Ŝafulo, la Savanto kaj la Flutisto. Tiuj ĉi du lastaj estas la plej interesaj: mi prezentu ilin.

*La Savanto* (jam antaŭe konata en privataj rondoj kiel la “ekzorcisto”) havas la potencon kapablon protekti po unu ludanton ĉiunokte kontraŭ la atako de homlupoj. Li estas vokita tuj post la noktigo, antaŭ la klarvidulino, kaj elektas sian protektoton. Tiu ĉi bonŝanculo transvivos al ĉia eventuala atako de la homlupoj. Tiukaze, la gvidanto anoncos neniun viktimon matene, sen plia klarigo. La Savanto rajtas protekti sin mem, sed ne la saman ludanton dum du sinsekvaj noktoj.

*La Flutisto* estas ia “memstara” persono kiu, kiel la amantoj, sekvas sian propran vojon. Iam

forpelita de la vilaĝo, li revenis post multaj jaroj sub malvera identeco. Li nun ne pensas pri io alia ol venĝi sin... ĉiunokte, li vekigas laste, antaŭ la fino de la nokto, kaj “ĉarmas” per sia fluto du ludantojn, kiujn li elektas, kaj redormas. Tiam, la gvidanto tuŝas la kapon de la ĵus ĉarmitoj, kaj demandas ke ili, kun ĉiuj jam ĉarmitaj ludantoj, vekigu por tiel rekoni unu la aliajn. Kiam ĉiuj ludantoj estas ĉarmitaj... gajnas la flutisto ! Pro tio, ambaŭ flankoj, la homlupa kaj la vilaĝana, bezonas rapide eltrovi la flutiston, kaj la ĉarmitoj ne emos elludigi ankoraŭ ne ĉarmitan ludanton por faciligi lian venkon. Sed ju pli pasas la tempo, des pli grandas la risko por la flutisto, ĉar li kaŝas sin inter pli kaj pli malmultaj ludantoj !

En 1943, Herman Hesse aperigis utopian romanon, kie fikcia ludo tiklas kun la ideo de universala lingvo. Eĉ se ĝi neniel parolas pri nia lingvo, tiu libro laŭ diversaj aspektoj tamen ege rilatas al Esperanto.

### Lingvemaj logikemuloj

Ĉu vi jam rimarkis? En nia movado svarmas komputilistoj, matematikistoj kaj ceteraj malvarmaj kalkulemuloj. Fakte, ĉiam estis tiel, kaj eĉ antaŭ la oficiala apero de nia lingvo, la temo «universala lingvo» jam estis afero de logikemuloj.

Raimundo Lullo<sup>(1)</sup> (1233-1316), estas unu el la eŭropaj pensuloj kiuj opiniis, ke logiko estas



## Jomo slavumas

### L'Europe de l'est comme si on y était

Ce nouveau disque de Jomo était vraiment dans le thème du dernier JI consacré aux Balkans mais l'album n'a paru que début mai.

Écouter cet album surprenant est donc l'occasion de prolonger cette visite. En effet Jomo, attaché aux pays de l'Est, y va souvent et en profite pour apprendre de nouveaux instruments ou mélodies traditionnelles. Ces voyages se font sentir dans les textes et le style dépaysant.

24 titres vont te donner envie de danser, chanter ou t'apporter un brin de nostalgie. J'ai assisté à une partie de l'enregistrement et deux chansons me sont restées en tête six mois («Jen pluaj foj» et la «Ĉuvasa arto»). La voix d'Irina (non espérantiste) est présente presque partout et celle de Jomo est parfois plus grave, à se sentir dans un concert russe.



en vente 18 € à la boutique

Depuis longtemps, il se produit sur scène avec un groupe slave (*Solnichka* et en costume !) ainsi qu'avec les *Libertarios* et présente ici des chansons originales ou traduites, certaines en relation avec l'espéranto. A noter une adaptation de «Sola», très connue dans les rencontres de jeunes.

Armelle

Une belle surprise t'attend si tu visites le site «base de données» des artistes espérantistes :  
[http://artista.ikso.net/eurokka/novajx/jomo\\_fr.php](http://artista.ikso.net/eurokka/novajx/jomo_fr.php)  
 (voir aussi le site de Vinilkomo, éditeur du CD où se trouve un extrait en mp3).

# La ludo de la vitroperloj

komuna bazo por interhoma kompreno: li mem tiom certis pri tio, ke li plurfoje transiris la Mezmaron por havi teologian diskuton kun la islamanoj, kiujn li esperis konvinki helpe de kombinatorika ilo de li koncipita, kiu generas nur verojn. Lia lasta klopodo estis tamen eble pli truda ol konvinka, ĉar Lullo estis mortŝtonigita de siaj kolerigitaj aŭskultantoj.

Same kiel Lullo, sed sen riskisian vivon, la granda filozofo Leibniz (1646-1716) revis ankaŭ pri logike bazita universala lingvo. Li skribas en sia «Scientia generalis»:

«Jen kion ni atingu: ke ĉiu paralogismo<sup>(2)</sup> ne estu alio ol kalkul-eraro kaj ke ĉiu sofismo, esprimata per tiu nova skribo, estu vere nura solecismo<sup>(3)</sup> aŭ barbarismo, facile korektebla per la solaj leĝoj de tiu filozofia grammatiko.

Tiam, ne plu necesus interdu filozofojn pli longaj diskutadoj ol inter du matematikistoj, ĉar sufiĉus ke ili prenu sian skribplumon, sidiĝu je sia kalkultablo (...) kaj diru unu al la alia: «Ni kalkulu !»

## Ludo kaj lingvo

Bela revo, fakte, kiun Zamenhofo ne tute plenumis: kvankam iom logike konstruata, multe pli ol la «naturaj» lingvoj ĉiukaze, nia lingvo ne ebligas la solvon de problemoj per simpla kalkulado.

Oni do povas kompreni ke la revo de Leibniz pluvivis eĉ post 1887. Unu enkorpiĝo de tiu revo estas la ludo de la vitroperloj, centra temo de la samnoma kvazaŭ scienc-fikcia romano<sup>(4)</sup> de Herman Hesse (1877-1962).

La ludo estis unue hobia de muzikteoriistoj. Matematikistoj transprenis ĝin kaj pluevoluigis ĝin, ĝis fakuloj de ceteraj kampoj malkovris la eblecojn de la ludo por la propra fako:

«Kio nun mankis al tiutempa ludo de la vitroperloj, estis la kapableco de universaleco, la ebleco ŝvebi super la fakoj. Astronomoj, helen-, latin-, skolastikfakuloj<sup>(5)</sup> kaj muzikstudentoj ludis sian sprite regulatan ludon, sed la ludo havis por ĉiu fako, ĉiu esplortemo kaj ties disbranĉoj propran lingvon kaj propran regularon.»

Sed iam, la vojo al universaleco de la ludo malfermiĝis, dank'al sennoma geniulo, kiun oni aludas per *lusor basiliensis*, la ludanto de Bazelo:

«Li inventis por la ludo de la vitroperloj la bazojn de nova lingvo, fakte de simbol- kaj formulingvo, en kiu matematiko kaj muziko samgrade partoprenis, kaj kiu ebligis kunligi astronomiajn kaj muzikajn formulojn, meti matematikon kaj muzikon super la saman denominatoron. (...)

La ludo de la vitroperloj, iam speciala okupo de la matematikistoj, de la filologistoj<sup>(6)</sup>, aŭ de la muzikistoj, logis iom post iom ĉiujn verajn intelektulojn en sian poststrion. Diversa malnova akademio, loĝio kaj precipe la praa Ligo de la Orientvojaĝantoj turnis sin al ĝi.»

## Knecht kabeas kastalie

Preter la ludo, naskiĝis Kastalio, utopia ordeno, simila al tiuj religi-intelektaj ordenoj pri kiuj Lullo revis (li ne nur revis pri logika universaleco!), simila eble al tiuj Jezuitoj<sup>(7)</sup> kun kiuj Leibniz tiel ofte rilatis. Sed male al la Jezuitoj, Kastalio kredas ne je Dio, sed je la ludo, kaj celas ties disvolvon, kaj sekve la disvolvon de la ceteraj sciencoj.

La romano prezentas al ni la vivon de unu altrangulo de la ordeno, Joseph Knecht (germanlingve, la servulo): Lian edukadon, lian malkovron de la ludo, lian supreniron ĝis la pintaj postenoj de la ordeno, kaj lian finfinan forlason de Kastalio.

Ekde 1968, multaj gejunuloj legis la libron kiel defendon de la individua rajto, libervole elektisian vojon al disvolviĝo, kaj multaj samideanoj certe povas rekoni sin en la kontraŭ-aŭtoritata atitudo de Knecht. Sed ili legu pli atenteme tiun libron: Klare oni povas rekoni «la universitaton» en Kastalio, aŭ kiu ajn grava institucio; tamen tiu Kastalio, per sia utopia naturo mem, estas ankaŭ tute komparebla kun nia propra movado, kaj eble en la diversaj kritikoj al Kastalio, eblas tralegi elementojn por prilumi tiun ankoraŭn ne tute komprenatan sed karakterizan fenomenon de nia Esperantio: la kabeado<sup>(8)</sup>.

## Ceteraj universalajoj

Ni ankaŭ povus tradiskuti la guston de Hesse por la iama kaj la eble onta internacia lingvo: la latina kaj la ĥina, aŭ longe prikomenti la gravecon de la oraklo Ji-king en la romano. Sed endas konkludi; ni nur aldonu ke la Ji-King, konsistanta el ses bastonetoj laŭhazardo ĉu truej ĉu plenaj, ĉu jingaj ĉu jangaj, ĉu nulaj ĉu unuaj, havas evidentan similecon kun la sola universala lingvo, kiun Leibniz finfine inventis: la binara nombrosistemo, bazo de la komputila kalkulo.

François Hoeltzli

Notoj :

- (1) Se Raimundo Lullo, Leibniz, kaj la tuta lingvema logikemularo interesas vin, kuraĝu tralegi la «Serĉado de la Perfekta lingvo» de U. Eco!
- (2) Paralogismo, sofismo: erara rezonado. Vd. NPIV por diferenco inter ambaŭ terminoj.
- (3) Solecismo, barbarismo: kruda lingva eraro. Vd. NPIV por diferenco inter ambaŭ terminoj.
- (4) Nedisponblas en nia lingvo. Legeblas franclingve sub nomo: «Le jeu des perles de verre».
- (5) Skolaktikismo estas la mezepoka filozofimetodo, ofte ridigita de la posteuloj. Sed Hesse laŭde parolas pri ĝi, ĉar skolastikismo evoluigis la metodojn de vere solida rezonado. Vi eble jam aŭdis pri la razilo de Okham? Li estis fama skolastikisto.
- (6) Scienco de la malnovaj lingvoj
- (7) La intelekta ordeno de la katolikoj, kiu celas konverti la elitojn (de la fremdlandaj precipe)
- [8] Kabei: Fari kiel Kabe, forlasi la esperantismon post vigla kaj sukcesa partopreno en la movado.

## Quand l'étoile verte fait parler d'elle

Un titre qui, ma foi, mérite une explication... Je me suis toujours demandé pourquoi en France l'étoile verte n'apparaissait pas plus souvent sur les sacs, manteaux, etc. des espérantistes, sans jamais recevoir de réponse satisfaisante. «Ça fait secte», «C'est vieux comme truc».

Autant d'arguments que je n'ai jamais considérés comme valables. Il y a quelque temps de cela, lorsque ma faculté était encore bloquée (pour la troisième semaine consécutive !), ne sachant que faire de mes longues journées, je passais de nombreuses heures au QG des grévistes, à organiser, dialoguer...

«On s'en fout, de ta vie», pourriez-vous dire... Mais soyez un peu patient et attendez la suite !

J'ai, accrochée au côté de mon couvre-chef (mon chapeau quoi !), une charmante étoile verte frappée du «E» d'Espéranto, que j'avais achetée à IS à un vendeur brésilien (ça, c'est pour le contexte). Une étoile ayant un pouvoir que je ne soupçonnais pas...

Durant toute la grève, des étudiants m'ont demandé ce que signifiait cette étoile, ou que voulait dire la lettre «E». Une prise de contact facile et très intéressante pour parler de l'espéranto !

Un matin, un nouveau tournant a été franchi puisque j'ai entendu une personne que j'avais «sensibilisée» expliquer à une autre ce qu'était cette langue et que c'était une super bonne idée... Il s'est d'ailleurs ensuivi un petit débat autour de la table du petit-déjeuner !

Pour l'anecdote, une personne qui ne se souvenait pas de mon prénom m'a appelé un jour «mister espéranto». L'atout

incontestable de cette étoile verte est que pas une seule fois je n'ai eu à faire le premier pas pour en parler (ce qui fait parfois un peu propagande), les gens demandaient d'eux-mêmes et étaient donc d'autant plus intéressés. Je me souviens d'une Assemblée Générale un matin alors que les débats interminables faisaient fureur, une jeune fille juste derrière moi



m'a soudainement demandé : «Excuse-moi, c'est bien l'étoile de l'Espéranto sur ton chapeau ? Je l'avais appris quand j'étais jeune !».

Sur une AG de 400 étudiants, combien d'espérantistes sont-ils ainsi cachés ? Comment ne pas s'extasier devant le pouvoir de ce si petit insigne qui fait tant parler de lui ? Ne nous posons plus de questions, chaque espérantiste se devrait d'essayer de porter ce symbole qui permet de parler de l'Espéranto, et de reconnaître les espérantistes quand nous les croisons.

Suis-je un cas isolé ? Non, ma petite sœur a cette étoile sur son sac et a, grâce à cela, parlé de l'espéranto dans sa classe, deux élèves vont depuis à un cours

et parlent d'aller à l'IJK cet été ! Nous avons la chance d'avoir un beau symbole (qui, sur mon chapeau, fait cow-boy), affichons-le ! De même que nos beaux «kalendaretoj» qui siégeaient fièrement sur une des tables du QG de la grève, et occupaient les mains de ceux qui s'ennuyaient...

Voilà, c'est tout. Je tenais à faire ce petit appel afin que chaque espérantiste puisse être reconnu par un autre et parler de cette langue autour de lui ! Notre étoile verte est un superbe insigne qui sait se faire remarquer, alors n'hésitons plus, faisons-lui honneur et portons la fièrement, rien de mieux pour que les espérantistes ne soient plus seulement des bêtes de l'ombre !

J'ai reçu plusieurs témoignages de personnes qui l'avaient portée et avaient grâce à elle rencontré des espérantistes dans des circonstances inattendues ! Quelqu'un m'a également parlé d'autocollants espérantistes sur sa voiture et d'une grosse étoile verte sur ça boîte aux lettres située sur un chemin de grande randonnée, et qui apparemment faisait parler les randonneurs !

Aussi pouvons-nous conclure :

«Si tous les espérantistes en faisaient autant, nous progresserions plus vite tellement la pub est importante !».

Quelqu'un m'a aussi demandé où on pouvait se procurer ce genre de gadgets espérantistes !

Une piste pour la boutique ?

Vivu la stel', vivu la stel',  
vivu la verda stel' !

*Sebeto (Sébastien Merlet)*